

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Jos. Brožfk, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Pošta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptoj oni ne resendadas.

INTERNACIA KONFERENCO POR KOMUNA KOMERCA LINGVO.

La komerca konferenco, okazinta en la belega Venezia de 2—4 aprilo, signifas novan kaj por ni esperantistoj tre ĝojigan artikolon en la historio de nia movado. Ĝi alportis al ni novan pruvon — alie ja ne estas eble — ke Esperanto eminente taŭgas por ĉiuj internaciaj rilatoj kaj jam nun per sia disvastigo alportas praktikajn utilojn al la uzantoj.

Ni tute ne ŝatas admiradon de personoj, ĉar ni opinias, ke ĉiu kultura, klera homo havas la homan devon subteni ĉiuforte la vastigon de internacia humaneco kaj de progrescelaj eltrovoj, sed jen ni devas akcentigi, ke la feliĉa vera iniciatinto de la konferenco en Venezia, same kiel de tiu en Genevo, estas nia fama oratoro d-ro Edm. Privat. Al li apartenas la dankemo de ĉiunaciaj esperantistoj, ke li senlace uzas siajn vastajn rilatojn kun oficialaj rondoj, ĉu en la Ligo de nacioj, ĉu en la Internacia laboroficejo aŭ alie, sole por sukcesigo de la esp. movado. Li fariĝis direktanto de la esp. ŝipeto naĝanta tra maro de malkompreno inter rokoj de malfavoro, sed li pravas, ke li estas direktanto bonega, sendube alkondukonta ĝin al la elektita celo. Sukceson al lia laboro!

La konferenco en Venezia, kunvokita de la Itala komerca ĉambro por Svisio en Genevo kaj patronata de la komerca ĉambro de Venezia, estis malfermita la Paskolundon je la 10. horo en la kunsida salono de la Komerca ĉambro de Venezia. Ĝin partoprenis 188 delegitoj oficialaj el 22 landoj. Inter ili estis: Internacia laboroficejo ĉe la Ligo de nacioj, la ĉeĥoslovaka komercministerio, la jugoslava financmin., la germana min. de interno kaj de transporto, la pola komercministerio, la rumana financmin. kaj le ĝen. direkcio de fervojoj, la persa delegitaro ĉe la Ligo de la nacioj 76 komercaj ĉambroj (ankaŭ el Ĉinujo, Egipto, Siamo, Maroko k. a.), 19 Internaciaj foiroficejoj, 233 fremdulaj kaj turismaj asocioj

ktp. Krom la komercomin. el Ĉeĥoslovakujo estis ankorau reprezentitaj: la komercaj ĉambroj de Brno, Olomouc, Opava, Hradec Král., Cheb (Eger), Liberec (Reichenberg), la foiroj de Praha kaj Liberec, la centra oficejo de la Turismaj ligoj en Praha, la Turismaj ligoj de Brno kaj Frývaldov, Klubo de ĉs. turistoj kaj ĉs. komerca unuiĝo en Brno. Honoran prezidon havis la Kom. ĉambroj de Londono, Parizo kaj Venecio, la vera prezidanto estis s-o Merchant, sendito de la Kom. ĉambro en Sheffield.

La konferenco celis konsiliĝi pri praktikaj servoj de Esp. kaj ĝia enkonduko en la internaciajn rilatojn de komerco, industrio kaj turismo. La oficiala lingvo de la konferenco estis Esp., kiun parolis ĉiuj delegitoj kaj tial ĉiu ajn tradukado kaj interpretado estis sen-necesa. Laŭ diversaj raportoj de delegitoj oni konstatis, ke multaj reprezentitaj korporacioj jam de longe kun eminenta sukceso uzas Esp. por siaj internaciaj rilatoj.

Speciale interesaj estis la raportoj de la reprezentanto de Internacia laboroficejo s-o Torelli, kiu deklaris, ke Esp. laŭ la statistiko estas la kvina plej uzata internacia lingvo (angla, franca, germ., hisp., esp.).

S-o André Baudet, prezidanto de la lerneja konsilantaro por la komercaj lernejoj, parolis jen pri la motivoj, pro kiuj la pariza komerca ĉambro decidiĝis enkonduki Esp. en siajn kom. lernejojn kaj rekomendi al aliaj kom. ĉambroj subteni propagandon de tiu ĉi lingvo.

La konferenco akceptis vicon da resolucioj, per kiuj ĝi rekomendas al la interesantaj rondoj enkonduki Esp. en kom. lernejojn kaj uzi ĝin en la kom. rilatoj internaciaj. Ankaŭ estis rekomendite enkonduki Esp. en la telegrafan uzadon — pro ĝia klareco kaj precizeco — apud la 46 lingvoj kaj kvar francaj idiomoj permesataj en la telegrafa rilato. (La statistikoj kaj rekomendoj de la konferenco aperos presitaj.) La konferenco turnis sin per speciala memorandumo al la Ligo de la nacioj, kies scienca komisiono studas la pro-

blemon de arta lingvo internacia, en kiu ĝi atentigas, ke la komerca mondo estas tre interesita pri la enkonduko de la lingvo internacia kaj rekomendis Esp. pro ĝia praktika eblo kaj disvastigo.

Samtempe kun la konferenco kunvenis Internacia komerca borso, aranĝata de la rumana delegito kaj industriisto s-o F i s h e r - G a l l a t i, kie estis faritaj diversaj negocoj. Ankaŭ okazis jen la aranĝo de la III. Internacia foira komisiono, sub prezido de prof. Dieterle el Leipzig, kiu laboris pri sia regularo. La reprezentantoj de la foiroj estis invitatitaj de la foiro de Padua viziti tiun foiron.

Iom malfrue venis la anonco de la itala ministro de komerco kaj industrio, ke li fariĝis protektanto de la Konferenco.

La konferenco aranĝita de neesperantista institucio, signifas por esperantistoj novan armilon por la propagando. Niaj propagandistoj certe scios bone ĝin uzi.

Laŭ informoj de s-o A. Pitlik.

oooo

EL REMEMOROJ DE PROVINCA AKTORO.

El »Črty humoristické« de Bohdan Kaminský. *)

Tre malbone estus, se oni neniam bone fartus. Ni travivis malbonajn epokojn, en kiuj ni estis kontentaj, se ni du aŭ tri kune povis enspireti la fumon el komuna cigaro por havi en stomako almenaŭ ion varman. Post

*) Bohdan Kaminský (pseŭdonimo de Karel Bušek) naskiĝis en 1859. Multe ŝatata disciplo el skolo de Jaroslav Vrchlický, li sekvis la Majstron en sia poemaro (epiko kaj liriko) formoriĉa kaj belstila. Elegio, meditado kaj erotiko troviĝas en

FELIETONO

LANDO DE NOKTMEZA SUNO.

(Fragmento el esperanta parolado de J. Pech pri Suomi—Finnlando en la halo de la urba muzeo en Pizeň, la 24. marton.)

El Helsinko ni vizitu urbon Wiipuri (svede Viborg), kiu estas unu el la plej grandaj kaj malnovaj en Finnlando. Ĝi kuŝas apud la golfo Wiipuri ĉe rekta fervojlinio Helsinko—Petrograd, proksime de golfo Saimaa. Fremduloj plej ofte veturadas tien per vaporsipo kaj reen per vagonaro. Post alveturo en Wiipuri vekas nian intereson la malnova kastelo Wiborg, kiu fiere kaj majeste leviĝas super la haveno. La kastelo estis finkonstruita en la jaro 1293 kaj fortike rezistis multajn sieĝojn dum diversaj militoj kontraŭ Rusoj. Estas vero, ke nuntempa Wiipuri aspektas tute moderne kaj estas karakterizita kiel komercurbo, sed kiu volas ekrigardi en mezepokon, tiu vizitu la malnovan kastelon Viborg kun ĝiaj granitaj turoj kaj herbo-

similaj mizeraĉaj tagoj, post tiaj nuraj skeletaĉoj el egiptaj bovinoj, ree venis kiel responde al nia sopiro momentoj, kiam ni eĉ vespermanĝis el realaj teleroj, tenante en manoj verajn forketojn kaj tranĉilojn.

Tio okazis en unu el niaj plej mizeraj ludhaltejoj, kie ni angoris leviĝante matene, kaj timzorgis metante nin en liton. Kiel tio finiĝos en tiu restadejo, tion scis neniu el ni. Ke ni certe pagos niajn loĝejojn, pri tio ni ĉiuj dubis Cetere, el kio pagi? Do, ni ĉiuj kun la direktoro mem memoradis pri la Sankta Skribo, kiu diras, ke »tiam okazos forkurado en tago sabata«.

Antaŭ ni estis cirko en la urbo. Ĉe ĉiuj stratanguloj ankoraŭ estis ĝiaj grandegaj aŝiŝoj — elefanto staris tie kapo malsupre, kruoj supre — tion ni kompreneble ne lertis kaj sekve de tio la rigardantejo estis malplena.

Bonŝance al ni ĝuste en tiu mizero ekaperis meceno, kiu, ho ve, al nia malfeliĉo verkadis tragediojn.

Li invitis nin al vespermanĝo, la kornobla homo, kaj post ĝi li laŭlegis al ni siajn teatraĵojn, la fihomo. Cetere ni ja aŭskultis eĉ ne flustrante. Nur unu sceno min foje ravis tiom, ke mi laŭte ekkriis. La direktoro, sciu, atentigis min pri la beloj de tiu sceno piedfrapante mian piedon. Komikulo Červenka subite tuis sufokiĝe tiel rimarkeble, ke li preskaŭ estus seniginta nin je nia lasta ĝojo, la vespermanĝoj. Ni do preferis pacience kaj silentante kiel musetoj finaŭskultis post ĉiu vespermanĝo kelkajn aktojn. Tio postulis abnegacion

lia poezia verkaro enhavanta krom tio impresojn el vivo en granda urbo kaj en naturo. Delikata ironio kaj mordanta satiro karakterizas parte ankaŭ liajn prozaĵojn. Li tradukis teatraĵojn de Molière kaj Hauptmann. (R. F.)

kovritaj fosajoj, historian monumenton de la meza-epoka Finnlando. Reziste ĝi ĉiam staris, kvazaŭ ĉefgardanto de la sveda regno, kontraŭ atakoj de la Rusoj. Ankaŭ en lasta tempo dum liberiga civitana milito ĝi ludis gravan rolon. Nuntempe, laŭ sciigo de nia gvidanto Hanes Koivu, sur la supro de la turo troviĝas senfadena telegrafio. Ne estas eble citi tutan historion de la urbo kaj de la kastelo, kiu havis diversajn posedantojn. Trarigardinte la historian kaj interesan urbon ni vizitis monton Papula, kiu troviĝas ekster la urbo. Tie-ĉi estas zorge kulturita urba parko kaj sur la supro de la monto estas fera observejo. El la supro de la observejo antaŭ niaj okuloj etendiĝas belega panoramo.

Ni povas vidi ne sole la maron kun ĝiaj golfoj, sed eĉ amason da rokaj insuloj, kovritaj de pratempo per verdaj arbaroj, kiuj rebrilas en smeralda nivelo de la marakvo. Rekte sub niaj piedoj prezentiĝas al mi la urbo kaj malantaŭe antikva kastelo Viborg. Nuntempe en la urbo fariĝas firma elemento pli potenca, kvankam en pli frua tempo Svedoj kaj Germanoj regis ĉion, ĉefe la komercon.

vere superhoman. Post mallonga tempo ni estis tiom harditaj, ke eĉ unu el ni ne svenis, kiam nia eminenta gastiganto neatendite prezentis sian tute pretan projekton — ho, kia teruro — ke li pruntedonos al ni, kompreneble senpage, unu el siaj teatraĵoj, por ke ni ludu ĝin.

Por ceteraj teatraĵoj de sia repertuaro la direktoro ankaŭ nenion pagis, kompreneble, sed ĉe tiu ĉi donacita ĉevalo oni decide ne rajtis kontroli la dentojn.

Nia dramverkisto estis drogisto, li posedis vendejon ĉe la placo kaj la specialaĵo de lia drogejo estis pulvoro kontraŭ ratoj. Iu el nia aktoraro faris kaŝeme ne tre sencan spritaĵon dirante, ke en tiu pulvoro troviĝas miksaĵo el liaj tragedioj, kiu ĝuste kaŭzis efikon tiom mirrakontan. Nia drogisto kompreneble ne sciis pri tiu malakra spritaĵo, kio cetere ne estis la sola afero, kiu mankis al lia ne tro ampleksa mondkompreno.

Li kutimis stari sur la sojlo de sia vendejo, sub anĝeletó senarte kolorigita, kiu ŝvebis alte en aero tenante en manoj ladan rubandon kun surskribaĵo »drogisto«. La estro de la firmo, nia meceno, sinjoro Vokroy, havis razitan vizaĝon, bonintencajn okulojn, lobon sur mentono, manojn metitajn en poŝoj kaj en la vendejo li havis bongustegan likvoron, kiu havis ian strangan nomon. Li invitis nin iam internen, tie li senhumorgis per iu estetikita traktato, post kio per sia likvoro (se mi almenaŭ sciis, kiel oni nomis tiun likvoron) li regajigis nin.

Ni do ludis iun modernan dramon de li.

Kelkaj scenoj estis vere Sardou'aj. Ili estis okaze tiuj, kiujn nia drogisto simple kaj laŭvorte estis kopiinta el dramoj de Sardou. Kelkajn scenojn kompreneble elpensis la aŭteró mem. Ĉi tiuj plaĉis ankoraŭ pli ol la

Malsuprenirante el la turo ni iom promenadu en belaspekta parko, kie troviĝas ankaŭ urba akvokolektejo. Poste ni vizitu la apudan komunumon, kie instruas esperantisto s-o Hannes Koivu. Jen en la lernejo estas instruataj infanoj de ambaŭ seksoj (nur en vilaĝoj). Laŭ lia sciigo ankaŭ la manlaborado de infanoj estas en Finnlando jam de longa tempo praktike uzata. Dum ĉeesto de instruisto la infanoj pretigas diversajn objektojn el ligno, kartono, ledo kaj eĉ el metalo. En la lernejo oni povas vidi belegajn pentraĵojn, kiuj montras la talenton de la malgrandaj laborantoj. Pro malmulte da tempo ni devas forlasi la bonan amikon eĉ la samideanojn, kiuj nin akompanis ĝis en stacidomon. La stacidomo estas ankaŭ por ni rimarkinda, ĉar apud la enirpordego troviĝas ambaŭflanke familio de ursoj, kiu atentigas nin, ke ni troviĝas en norda regiono. La samideanoj restas kun ni ĝis lasta momento, donante al ni ankoraŭ bonajn konsilojn. Vere malfacile ni adiaŭas kun tiuj ĉi sindonaj, sinceraj gesamideanoj! Eksonis la fajfiloj de konduktoroj, la vagonaro ekmoviĝas kaj ni forveturas al alia ĉarma norda regiono.

scenoj de lia pariza kolego. El tiuj originalaj scenoj unu prezentis sekvantan okazon: Iu amiko de geedzoj venis vizite al edzino de sia konato, li eksidas apud ŝi ĉe tablo, parolas pri Meyerbeer, pri la unua prezentado en teatro, li manĝas viandtranĉaĵojn laŭ viena maniero frititajn, li trinkas vinon, karesas la manon de sia gastigantino, li faras al ŝi deklaron pri sia amo, postulas unu kison de ŝi kaj estas fine sufokita de sinjoro edzo subite alrapidinta.

Ĉar ni menciis vinon, nia amiko de geedzoj — ne forgesu, ke la sceno okazas en Parizo — faras reklamon al nia vino el Mělník. La aŭteró ja enmetis en lian rolon la vortojn: (tre senteme, kun fajreljetantaj okuloj): »Ha, kia elektega vino, jen la sango el vinbermontetoj apud Mělník, la nefalsita suko de Karlo IVA!« Ĉi tiuj vortoj apartenis al tiuj, kiuj ne estis prenitaj el Sardou. Koncerne la viandtranĉaĵojn, estas necese menci, ke ili devis esti efektivaj, veregaj viandtranĉaĵoj frititaj speciale por tu prezentado.

La prezentado de l' amiko de geedzoj, la aktoro Zavadil, ĝojatendis tiun rolon. Li nome estis vere pasia adoranto de vienaj tranĉaĵoj kaj por manĝi ilin li estus suferinta eĉ dufojan sufokon. La kompatindulo havadis por vespermanĝi nur »olomouc'an« fromaĝeton, sed ankoraŭ pli ofte nur panon sen butero. Sed iam la evangelio diras: »Ne per nura pano nutriĝas homo«.

Zavadil estis bonulo, li estus dispartiginta sian koron por donaci duonon, estis tamen necese konduki je li bonkore. Kolerigite li perdis mildecon, li estis kiel leono, sed, se ĝi estas tiel furioza kiel Zavadil, oni povas gratuli ĝin.

La publiko antaŭsciis, ke io stranga prepariĝas. Ĝi eĉ sciis, ke Zavadil manĝos sur la scenejo realajn tranĉaĵojn kaj oni ĝenerale estis scivolema pri tiu prezentado, pri sinjoro Vokroy, pri ĉio.

Jam je la dua horo posttagmeze sinjoro Vokroy ordonis fermi la butikon kaj poste li per paŝoj vere junulaj ŝvebiris al razisto. El lia metiejo li eliris kun vangoj razitaj kaj briletantaj, kun haroj parade ondofrizitaj. Li surhavis ĉamaron, blankan yeŝton, blankan kravaton, senton pri vivemo, ciritajn ŝuojn — mallongavorte, li montris al siaj samcivitanoj, kiel la bonedukita homo devas iri al la unua prezentado.

Sinjoro Vokroy posedis prosperantan komercejon hereditan de sia avo, kaj li povis tuj edziĝi. El tio sekvis, ke la teatro estis superplenigita en pli ol du trionoj de virinoj: patrinoj serĉantaj edzojn por siaj filinoj kaj fraŭlinoj serĉantaj bofilojn por siaj patrinoj.

Sinjoro Vokroy sciis, ke la signifplena momento estas venanta. Li sciis, ke li estas heroo de la tago. Li surpaŝadis la piedojn

de ĉiuj kaj li premadis manojn de siaj konatoj, kvazaŭ li premegus ilin per teniloj. Li ridis distrite, li tusetadis kaj senĉese fiksigis la blankan kravaton, kies ligaĵo ŝoviĝadis super lia amelita kolumo.

La prezentado okazis sen malhelpo, sinjoro Vokroy brilis kiel lampiono, la direktoro estis kontenta pri profito, la publiko ridis, la muzo Thalio interplektis la manojn — ĉio superis la atendon. La okuloj de Zavadil brilis, li deklaris la amon kun tiom da virtuozece, ke nia naŭvulino, je kiu li estis en aminterrilato, ne forlevis de li siajn okulojn — subite lia vizaĝo ŝanĝiĝis, liaj okuloj turniĝis ĉiufanken tiel, ke nia intrigrolulo enviis lin — kaj ekestis paŭzo.

Inter la publiko laŭtiĝis maltrankvilo. Ver-simile io terura okazis, io neatendita, kio evidente ne estis en la rolo de Zavadil.

La servistino alportis malplenan botelon, du glasetojn kaj teleron, en kiu anstataŭ la viandtranĉaĵoj tiom sopire atenditaj de Zavadil estis tranĉaĵo de pano.

Sur la scenejo subite okazis tombara silento. La brueto en publiko tuj eksilentis, oni aŭdis nur la voĉon de sufflato. Trifoje li ripetis la saman frazon, sed Zavadil ne aŭdis, ne vidis. Li estis preskaŭ duonsvenigita. En lia vizaĝo vidigis sin terura kolero kaj oni vidis, kiel liaj lipoj tremetas.

Subite li ekrigardis malantaŭ la kulisojn, li ekkraĉis, per rapida movo li deprenis de la kapo elegantaĉan perukon, li etendis sian dekstran manon al teleron, li kunpremis la panon, ekĵetis ĝin al orkestro kaj dum teruriga silento li laŭtege ekvokis:

»Ludu tiu, kiu formanĝis miajn viandtranĉaĵojn!« Per sia piedo li renversis la seĝon, kiu baris la vojon kaj foriris.

Oni malsuprenigis la kurtenon.

Oni rakontis, ke la direktoro mem estis formanĝinta la viandtranĉaĵojn. Ili bonodoris tiel alloge, ke li ne rezistis. Sed en tiu skandalo li ĵuris pri sia senkulpeco tiom energie kaj tutinsultis la aktoron Zavadil tiel fundamente, ke almenaŭ la publiko kredis, ke nia direktoro estas senkulpa kiel virgino.

Kvankam la konsternita Vokroy proponis, ke li tuj mendoŝ novan porcion de viandtranĉaĵoj, estis jam malfrue, la skandalo estis okazinta, la duono de la publiko jam estis foririnta kaj oni vane serĉis la postesignojn de Zavadil.

Post duonhoron nur oni trovis lin kaŭranta sub la scenejo. Li insulte nomis sin azeno, li lamentis, ke li estis endomaĝinta sian karieron kaj deklaris, ke li neeviteble devas dronigi sin.

* * *

Krom la pulvoro kontraŭ la ratoj havis sinjoro Vokroy en stoko ankoraŭ aliajn tragediojn, li verkis eĉ du opertekstojn kaj li

certigis, ke li verkus almenaŭ unu teatraĵon ĉiumonate, se li ne bezonus okupiĝi pri sia banala komerco.

Ne esperite lia muzo refoje akusiĝis kaj sinjoro Vokroy al ni alportis ĉe subbrako sian delikatan ĵurnaskiton, kavaliran tragedion en ses aktoj.

»Por ĉi tiu tragedio oni bezonos pli grandan regionon«, li diris, »en la kvina akto okazas festeno por ses personoj, oni komencas manĝante supon — sed, diablo prenu kvindek da florenoj, ĉu ne vere?«

La intereso pri humaneco postulis, ke la direktoro respondu: »Ne.« En nia intereso li rajtis diri: »Jes.«

Kaj li oferis sin, li mem elektis unu rolon kaj diris: »Jes.«

Multon, multegon oni jam skribis pri la naturalismo sur scenejo. Sinjoro Vokroy, drogisto, superatutis la ĝisnunan naturalismon per unu frapo. Ne en sia kvalito verkista, sed kiel homo, por kiu kvindek da florenoj ne estis tre grava afero, se li volis akiri aŭtoran gloron.

La delikata infaneto de la drogisto-dramaturga muzo de sinjoro Vokroy ricevis bapte la nomon: »Festeno de Fridrich el Falz, la tiel nomata unuvintura reĝo.«

Ni ĉiuj havis multegon por fari preparante la scenigon de la unua prezentado. Pleje la kuiristino en la hotelo, kie nia Thalio estis stariginta sian tendon.

Senutile estus rakonti al vi la enhavon. Se Dio pardonus al mi ĉiujn miajn ŝuldojn, mi ne povas rememori, pri kio temis kaj kion oni parolis. Mi scias nur tion, ke en la kvina akto travundas sin reciproke ĉirkaŭ kvar ĉefaj nobeloj, eble por tiu celo, ke ĉe la manĝado en kvina akto ne partoprenu tiom da buŝoj.

La direktoro mem ludis la rolon de Fridrich. Fakte mi mem avidis tiun rolon, sed la direktoro elektis ĝin pli frue ol mi, ĉar la reĝo havas superrangon en ĉio, li estas la unua, kiu prenas pecojn el plado, kaj li rajtas elekti la plej grandan porcion.

La aŭtoro sidis en la unua vico de seĝoj. Dum interaktoj li ne preterlasis la eblon starigi sin turninte vizaĝon al publiko. La kompatindulo, li estis bonkora, kaj al neniu li volis kaŭzi doloron. Li ne povis konsenti, ke iu foriru el la teatro seniluziigite, ĉar oni ne havis la bonŝancon vidi la vizaĝon de verkisto tiom genia. Liaj haroj refoje briletis de pomado, la ligaĵo de blanka kravato refoje elstaris super lia kolumo kaj sur la frunto de la feliĉa aŭtoro oni povis legi signifan surskribaĵon: »Nu, vi miru!«

La sonorileto ektintis, sinjoro Vokroy ankoraŭ rapide elaŭdis kelkajn komplimentojn, li turnis sin al scenejo kaj la kurteno levigis.

Kavalira ĉambrego en la Praha'a kastelo. Ambaŭflanke de la pordo sur la muro pendis la portretoj de Palacký kaj de Rieger, kaj super la pordo la kronigaj juveloj de l' reĝlando Bohemujo, la kolorigita premio el revuo »Světazor«.

Rokokan meblaron kun florteksita tegaĵo, kanapon kaj kvar seĝojn pruntedonis la aŭtoro mem.

Malantaŭ la scenejo ekaŭdiĝis pafoj. Tio estis la batalo sur Bílá Hora.

En reĝa kastelo ni, akurate laŭ historio, eksidas por festeni.

Fridrich el Falz sidis ĉe la fronto de la tablo kaj li efektive komencis manĝante supon, vermiĉelan supon; jen la aŭtoro jam iomete deflankiĝis de l' akuratega tradicio historia. Vi ja pardonos, la poeto estas poeto, li konas le celojn de l' arto kaj ian etan deflankigon de la vero li rajtas uzi.

Le reĝo Fridrich mem ĉerpante el supujo disdonis al aliaj, li sekve ekmanĝis la lasta, sed, admirinda afero, li estis la unua, kiu finmanĝis sian supon kaj li prenis la duan porcion. Efektive, mi mem jam estis manĝinta diversajn supojn, mi eĉ dufoje kuiris ilin, sed ĉi tiu estis vere famega, vera kermesa supo, kun surfaco prezentanta unu grasrondaĵon apud la alia kaj ĝi estis plene de anseraj tripoj.

Manĝante la supon ni tute ne parolis.

Jam la publiko komencis puŝi sin per kubutoj.

La direktoro improvizis: »Sinjoroj«, li diris memrespekte, sed verve kaj konvinkite, »ĉi tiu supo efektive meritas, ke la reĝo ĝin manĝu. Do, mi prenos ankoraŭ unu porcion.«

Kaj li prenis ĝin.

La publiko ridis jam.

Du paĝioj eniris. Unu portis bovaĵon, la dua sardelan saŭcon, ruĝan beton kaj kukumojn.

La publiko ironie aplaŭdis. Malantaŭ la scenejo tondradis kanonoj. Nia sufloro ion flustris, laŭte diradis, fine kriadis — mokinda ago, se la tondrado de pafitegoj nin ne maltrankviligis, la sufloro absolute ne sukcesis maloportuni nin. Li ja koleris ne rajtante partopreni en nia festeno. Kiel post sonĝo mi memoras, ke ankoraŭ mi estis ion parolonta laŭ mia rolo, sed, por kia celo — mi metis en buŝon iom tre grandan manĝopecon — kaj krom tio, kial mi estus fuŝmanĝinta la bongustegan saŭcon pro ia malsaĝa parolaĉo.

Kaj la kanonoj daŭrigis la tondradon.

Iu en la publiko ekvokis: »Bonan apetiton!« »Ni dankas,« respondis Fridrich el Falz. Li ne forgesis pri sia rolo kaj sciis, ke la monarĥoj titolas sin majeste »Ni«.

Kun bovaĵo ni ricevis glason da biero el Plzeň. Bedaŭrinde ĝi ne estis sufiĉe malvarmigita.

Sed subite tra la tuta teatro ekblovis bonodoro — pardonu, mi eraris — dia bonodoro de porkrostaĵo, de pastbuletoj kaj de brasiko.

Salivo amasiĝis sur la lipoj de nia sufloro. Li inspiris al mi kompaton, la mizerulo. Kiom da fojoj li savis min, li estis zorgega homo, se ni ne bone aŭdis la unuan fojon, li ripetis kelkan frazon eĉ kvarfoje kaj se li rimarkis, ke ni venis kriza momento, ke ni estas superstate tedegitaj, li ellasis eĉ longajn scenojn — simple dirite, mi eksentis riproĉon de konscienco, mi metis en teleron sufiĉe grandan pecon da rostaĵo, mi alĵetis brasikon, surmetis pastbuleton kaj portis ĉion al lia kesteto. Li ankaŭ ĝuu!

Kaj ni daŭrigis la festenon. Mi opinias, ke le fama kuiristino Rettigová mem ne estus hontinta pro simila kuirmaniero. Ni estis kontentaj plenmezure. Nur al unu kritikulaĉo el publiko tio ne plaĉis, li komencis insulti kaj subite li kolere kriis al ni de la malantaŭa benko:

»Ĉu longe ankoraŭ daŭros tiu pantomimo?«

Vi komprenas, ke ni juĝis ne digna respondi al simila demando.

Sed tuj alia rigardanto kuraĝiĝis kaj vokis:

»Kelnero, ankoraŭ unu porkrostaĵon!«

Kaj la tria alpaŝis ĝis la scenejo kaj kamarade demandis:

»Ĉu vi trinkos ankaŭ kafon?«

»Jes,« respondis Fridrich el Falz. »Ni trinkos ĝin, kaj poste ni siestos.«

Fakte ni jam ne siestis, sed la publiko malgraŭ tio ne venis en teatron, kvankam ni intencis ripeti la kavaliran tragedion.

Sed sinjoro Vokroy ne havis la saman deziron. Li furiozis. Arogante kaj nekaŝeme li diris al ni ĝuste en vizaĝon, ke ni manĝis ne kiel korteganoj, sed kiel lupoj. Tion mi ne scias, mi neniam estis en bestomontrejo dum la manĝigado kaj mi absolute neniam nenium kopiis. Mi estis ĉiam neimitema, kaj se mia rolo ordonas al mi, ke mi manĝu, se oni metas antaŭ mi sur la tablon manĝaĵon, kiun mi trovas bona — kial mi ne manĝu?

Tradukis Rudolf Fridrich.

ooo

EL MONTARO PRINTEMP' VENIS...

(F. H.)

El montaro printemp' venis,
venis nokte, dum silento,
kun ekrido en vizaĝo,
sur flugiloj de la vento.

Tero sonĝas en la dormo —
kio vibras en aero?
ĉu feinoj ludas mole
eĉ en nuba la vespero?

Muĝas akvoj sub la neĝo,
vigle fluas la torento
kaj en homa, laca koro
ree spiras nova sento.

Kiu lasis, ho, postsignojn
en la roso diamanta
sur herbejoj, en arbaroj
kaj foriris sopiranta?

Venis bona magiisto —
ĉu jam vera tiu ĉarmo,
kiun en matenoj kelkaj
kreis brila suna varmo?

En nestetoj sur la ovoj
sidas birdo susurante,
ĝin salutas juna printemp'
preter branĉoj galopante.

Pala de la longa vitro
reruĝiĝas homa vango,
kun pli fortaj korekatoj
pli rapide pulsas sango.

Super kampoj, en arbetoj
milda kanto najtingala
flugas amela la koro
kiel fablo ideala.

Sur ĉielo en la nokto
pala Luno ĉarmoplena —
en animo ploras preĝo
pri ĵuneco senrevena.

Riedl.

KULTURO

Memorindaj datoj en aprilo. La 2. a. 1805 nask. H. K. Andersen, la dana verkisto. — La 3. a. 1897 mortis J. Brahms, la aŭstria komponisto. — La 4. a. 1291 forbrulis preskaŭ tuta Praha. — La 5. a. 1835 nask. Vítězslav Hálek, la ĉeĥa poeto. — La 6. a. 1909 estis atingita norda poluso de Peary. — La 6. a. 1905 estis fondita Internacia societo esperantista por la paco en Parizo. — La 7. a. 1921 la X. Internacia konferenco de la Ruĝa Kruco akceptis rezolucion pri lernado de Esperanto en la ruĝkrucaj organizaĵoj. — La 7. a. 1348 estis fondita universitato de Praha de Karolo IV. — La 9. a. 1901 prezentis generalo Seberty kaj Ch. Meray Esperanton al la Franca akademio de Sciencoj. — La 9. a. 1241 venkis Tataroj apud Lehnitz. — La 11. a. 1825 nask. F. Lassalle, socialista gvidanto. — La 12. a. 1841 nask. Jul. Zeyer, la ĉeĥa verkisto kaj romantika poeto. — La 13. a. 1904 mortis Vasil Vereščagin, la rusa pentristo. — La 14. a. 1917 mortis en Varsovio Dro. L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto. — La 14. a. 1865 estis mortigita Abraham Lincoln, la prezid. de Usono. — La 15. a. 1912 pereis Titanic, tiama plej granda ŝipo de la mondo. — La 19. a. 1906 estis mortigita per aŭto-

mobilo P. Curie, malkovrinto de radiumo. — La 21. a. 1500 portugalo Cabral malkovris Brazilion. — La 22. a. 1724 nask. Imanuel Kant, la germ. filozofo. — La 23. a. 1616 mortis W. Shakespeare. — La 24. a. 1877 eksplodis ruso-turka milito. — La 25. a. 1874 nask. G. Markoni, la eltrovinto de senfadena telegrafio. — La 26. a. 1711 nask. filozofo David Hume. — En j. 1910 mortis Bj. Björnson, la norvega verkisto. — La 27. a. 1791 nask. S. Morse, la eltrovinto de skribotelegrafio. — La 28. a. 1753 nask. F. Achard, la eltrovinto de la sukerproduktado el rapo. — La 29. a. 1769 nask. Wellington, venkinto kontraŭ Napoleono. — La 30. a. 1622 la universitato de Praha estis transdonita al Jezuitoj.

Du universitatoj en unu urbo.

En Belgio formas la Flandroj duonon de la tuta loĝantaro, sed tamen ili ĝis nun ne sukcesis akiri egalrajton kun la duono valona. La lingvo franca, kiel oficiala, estas lingvo de la tuta reĝlando, dume la flandra estas lingvo sole de kelkaj regionoj.

Tiu ĉi diferenco montriĝas ĉefe ĉe la altaj lernejoj. Belgio havas entute kvar universitatojn kaj en ĉiuj oni prelegas france. Sole la universitato en Louvain (Leuven) enkondukis ankaŭ kelkajn prelegojn en la lingvo flandra. La flandraj nacionalistoj nuntempe postulas, ke ilia nacio posedu almenaŭ unu universitaton kun instrua kaj ekzamina lingvo flandra. Ĉar unu el la ŝtataj universitatoj troviĝas en Liège (la aliaj du estas privataj), en regiono pligrandparte valona, oni opinias, ke la dua ŝtata universitato en Gent povus transformiĝi en la universitaton flandran. Tiu ĉi ideo estas tiom pli simpatia, ĉar Gent estas lokita meze en la regiono de antikva flandra kulturo.

Estas certe, ke tiu ĉi propono vekis vivan diskuton en la publiko, sed ĝia efektiveco trovis malaprobon ĉe la valona parto de la loĝantaro, ĉefe de la studentaro. Oni do serĉis kompromison, kaj jen aŭdiĝis voĉoj, fondi en Gent novan universitaton flandran, flanke de la malnova universitato franca. Gent tiel fariĝus sidejo de du universitatoj, same kiel Praha.

Estas interese, ke la universitataj cirkonstancoj de Praha ĉe tiu ĉi okazo venis en la diskuton. Nome, la malamikoj de la flandra universitato deklaras Praha-on kiel malfeliĉa ekzemplo. Jen fragmento el parolado dirita en la Brusela senato de unu el partianoj de la dispartigo de la Genta universitato:

»Niaj malamikoj diras, ke la kunvivo de du universitatoj en unu urbo havus sekvojn bedaŭrindajn. Tiu ĉi kunvivo kaŭzus en Gent fokuson de malpacoj kaj de bataloj, kiel pruvas la malfeliĉa provo en Praha. Pro dio, sinjoroj, min ne surprizas, ke en Praha estadis ofte viglaj bataloj inter la ambaŭ universitatoj. Praha en sia kerno estas urbo de malpaco. Sufiĉas nur ĝin viziti por vidi, ke ĉiu ŝtono estas tie kovrita, saturita de sango. Ĉiuj eŭropaj malpacigoj, lingvaj, religiaj, politikaj, havis en Praha la plej fortan resonon. En Praha oni ĉiam batalis en la stratoj, en la lernejoj, en la preĝejoj. En la parlamento iam okazadis scenoj nedireblaj. Sekve ne estas mirinde, ke oni tie batalis ankaŭ en la universitatoj. Feliĉe ni tie ĉi (en Belgio) ne estas tiaj.«

Konanto de la vivo en Praha certe tiel ne parolus. La ĉeĥa kaj la germana universitatoj pli sin reciproke ignoris ol montris reciprokan venĝemon. La

veraj malpaciĝoj estis tre maloftaj. Se la parolanto pensis pri iamaj studentaj luktadoj en la avenuo »Přikopy«, tiam li eraris, se li vidis tie ĉi rilaton inter la »bumloj« de »burŝoj« kaj la reformaciaj bataloj. Sangokovritaj ŝtonoj estas troveblaj ne nur en Praha, sed en ĉiu urbo, havanta lokon en la historio, ekzemple tuj en Gent mem. Kaj rilate la studentajn luktojn oni povas trovi ekzemplon ankaŭ en la universitato de Louvain, kie la studentaro de ambaŭ nacioj luktas pli akre ol iam la ĉefa kaj germana studentaro en Praha.

Estas komprenebla, ke la kunvivo de du universitatoj en unu urbo gvidas al la konkurema rivaleco. Sed tiu ĉi rivaleco povas kaj eĉ devas resti en certaj limoj kaj tiam ĝi estas fonto de dezirinda luktado kultura. Tia rivaleco ne nur ne malutilas, sed kontraŭe ĝi alportas profiton. Ni konfesu, ke la ambaŭ universitatoj en Praha ne estas ankoraŭ en tiu ĉi dezirinda rilato, kaj ke ili gvidis ĝis nun luktojn ĉefe politikajn. La kaŭzo estis la malegala mezurado de Vieno. Dume la germana universitato estis karesata, la ĉefa devis batali pri sia fizika ekzisto. La unuaj jaroj de nia memstaro certe ne estas tiom multaj por povi korekti la tutan maljuston. Kaj tiel la universitato de Karolo konkrete malzorgita kaj supersarĝita de studentaro konfide me kaj pacience atendas pli bonajn tagojn.

Se en Gent oni fondos la duan universitaton, ne estas necese timi, ke tie devenos fokuso de malpacoj. Se oni mezuros al la ambaŭ universitatoj egale, ne estos kaŭzoj de politikaj malpacoj. Cetere ekzistas en la mondo pli multaj lokoj kun du universitatoj kaj la altlerneja vivo estas tie trankvila, ĉar la ambaŭ universitatoj estas finance tute sendependaj. La du universitatoj en Amsterdam jen estas ekzemplo.

Sed Praha neniel meritas esti montrata kiel nek sukcesita provo de altlerneja politiko.

(El ĉefa ĉefa ĵurnalo »Národní Politika«.)

o o o o

LEGOLIBRO.

La edukisto. Iu scienculo, fama profesoro kaj pedagogo, vorte kaj skribe proklamis la veron, ke la gepatroj ne scipovas eduki siajn ĝemfanojn, ĉar ili pereigas ilian volon jam en infanaĝo. Al la infanoj oni devas plenumi ĉiun deziron, se oni volas eduki homon kun forta karaktero. Tiu ĉi glora pedagogo havis amikon, kiu havis trijaran fileton. La amiko volante kun sia edzino viziti teatron, petis la kamaradon, ke li gardu lian knabeton. La profesoro volonte konsentis kaj gardis. »Mi dezirus la horloĝon, kiu pendas sur la muro«, insiste petis la fileto, apenaŭ la gepatroj estis malantaŭ la pordo. Sinjoro profesoro sen kontraŭparolo suprenrampis la seĝon kaj deprenis la horloĝon. »Sed mi volus havi ankaŭ la hokon, je kiu la horloĝo estis pendanta«, daŭrigis la zorgato. Sinjoro profesoro denove suprenrampis seĝon kaj donis al la knabeto ankaŭ la hokon. »Nun mi volas ankoraŭ la truon restantan en la muro«, kriegis la bubaĉo. Jen la profesoro kun sia pedagoga prudento restis senkonsilia kaj li rapide alvokis la servistinon.

Serĉado de feliĉo kaj kontenteco.

Jen fabelo malnova kaj konata: Foje iam vivis reĝo kaj li malsaniĝis. El lia tuta regno alvenis kuracistoj kaj sorĉistoj por lin resanigi, sed la reĝo estis senĉese malsana. Fine aperis profet-

talenta sorĉisto kaj tiu diris: »La reĝo resaniĝos tuj kaj neniam plu li malsaniĝos, se li vestos sin per ĉemizo de iu feliĉa kaj kontenta homo. Tiu ĉi antaŭdiro estis por ĉiuj ordono. Amaso da servistoj iris ĉiufanken en la grandegan regnon kaj ĉiun homon ili demandis, ĉu li estas feliĉa, ĉu li estas kontenta. Sed neniu jesis. »Feliĉa?«, ĉiu demandis mirigite. »Tute ne!«

Fine ili alvenis en flanke kuŝantan regionon de la reĝa regno, kie sur granda paŝtejo apud arbaro grizulo gaje kantante, paŝtis brutaron. Plenĝoje ili rapidis al li.

»Kiel vi fartas, amiko?«

»Bone.«

»Ĉu vi estas feliĉa kaj kontenta?«

»Ho, kial mi ne estus!«

La reĝaj servistoj estis treege ĝojigitaj. Ili trovis, kion ili serĉis tiom longe; tial ili tuj komencis trakti kun la maljunulo.

»Aŭdu, amiko, ni volas vian ĉemizon kaj ni pagos ĝin per oro tiom, ke vi estos ĝismorte riĉa. Donu ĝin al ni.«

»Ĉemizon doni? — tion mi ne povas!«

»Kial?«

»Kial? Mi ĝin ne portas, ĉar de longe mi ĝin ne posedas.«

Trad. A. Žaludová.

LINGVA FAKO.

Oficiala radikaro.

Kun dato de julio 1922 eliris kolekto de ĉiuj ĝis nun oficialigitaj radikaroj esperantaj kun la titolo: »**Th. Cart: Vortaro de la oficialaj radikoj de esperanto laŭ Universala vortaro kaj la tri oficialaj aldonoj.**« en bela 32paĝa broŝureto por 1 f franko ĉe Esperantista centra libejo en Paris, rue de Clichy 51. La oficialeco de la eldonaĵo neniel estas montrita krom surskribo »Kolekto de la akademio«. La libreto devus fariĝi ofte uzata helpilo de ĉiu esperanta verkanto, ĉar li kompreneble devas sisteme klopodi uzi la oficiale aprobitajn radikojn en iliaj aŭtoritate elektitaj formoj. Kelkaj aŭtoroj ankoraŭ ne faras tiel, ne pro tendenco enkonduki ion novan sed simple, ĉar ili tro malofte foliumas la vortarojn. La lego de tiu ĉi vico de oficialaj radikoj estas tre instrua, ĉar ĝi montras ĉiujn preferojn kaj mankojn de nuna lingva stato de nia afero. Antaŭ ĉio ĝi dokumentas daŭran evoluon de esperanto, evoluon ne hazardan sed per kolektiva volo kaj plaĉo regulatan. La nombro de la oficialaj radikoj duobligis de la jaro 1905, kiam aperis Universala vortaro en Fundamento. Tiu fakto sola montras naivecon de idistaj babiladoj pri neebleco de lingva evoluo de esperanto. Specialan intereson donas al la recenzata verko, ke la aŭtoroj (Cart kaj Grosjean-Maupin) provis la kelkfoje priparolatan »kribron« de la radikoj: ili montris per kursiva preso tiujn, kiuj »estas malpli gravaj, ĉar ne ofte uzataj aŭ pli malpli teknikaj aŭ eĉ, kvankam oficialaj, malpli konsilindaj ol la pli pure esperantaj formoj.« Laŭ mia opinio sole la lasta motivo devus decidi pri forstreko de iu radikoj. Malofteco de uzado estas tamen ĉe kelkaj radikoj natura sekvo de ilia signifo kaj la teknikaj radikoj devas tamen neniel diferenci en siaj kvalitoj de la »komunaj«. Sed se efektive iu radikoj estas homonima kun alia vorto, certe venis jam la tempo konsili neuzon de ĝi aŭ anstataŭon per alia vorto. Kompreneble la afero estas tre malfacila. »Pro la personaj preferoj,

kiuj sur tiu kampo ludas gravan rolon, tre malfacila, ne agrabla estas tia laboro, diras la aŭtoroj. Tial ili saĝe atentigas, ke ilia klasifiko ne havas eĉ iom da oficialeco, sed estas tute privata provo. Ĝis nun vere estas eblaj la vidmanieroj tre diversaj. Mi en multaj okazoj preferus alie. Kial oficialigi krome Jesuo (laŭ la 3. aldono) ankoraŭ Jesuo? Ĉu la vorto intervjui estas malpli teknika ol la vortoj abdiki, adjutanto, akvario? La aŭtoroj preferas la radikojn de vortoj agronomo, demokrato, diplomato, filozofo k. s. al tiuj de agronomio, demokratio, diplomatio, filozofio; mia pritrakto instruas al mi la kontraŭon, ĉar la ĉefa ideo estas la ideo de la koncerna scienco aŭ celado derivita deus est nomo por la homo ĝin praktikanta, do: agronomiisto, demokratiano k. t. p. Erara estas penso, ke oni ekz. por pomvino nebezonus specialan radikon: en preskaŭ ĉiuj vinkulturaj ŝtatoj la vinproduktantoj sukcesis per leĝo konstati, ke alkohola trinkaĵo ne farita el vinberoj ne devas porti la nomon vino. — Tiuj kritikaj rimarkoj kompreneble ne malgrandigas la valoron de la libreto. Stan. Kamaryt.

DIVERSAĴOJ

Tiu ĉi numero aperas iom malfrue kaj ni petas pro tio pardonon de niaj afablaj legantoj kaj abonantoj. La venonta (maja) numero aperos kiel kutime fine de la monato.

Ampleksa ekspozicio aranĝita de Esperanta Unuiĝo kaj Klubo de fotografaj amatoroj en Ĉervenĝ Kostelec vekis grandan intereson inter la vasta neesperantista publiko. Pli ol 1100 personoj venis rigardi la rezultaton de loka movado. Ĉiuj aĵoj apartenis nur al samideanoj de tiea Unuiĝo. Ĝojiga fakto estas, ke la ekspozicio plene akiris sian celon!

La centro de ĉs. komercaj ĉambroj en Praha, laŭ la propono de Ĉs. komerca unuiĝo en Brno, decidigis peti la ĉs. ministeriojn de instruado kaj de komercio enkonduki Esp. en ĉiujn komercajn lernejojn, kiel komence fakultativa kaj post akiro de sufiĉa nombro de ŝtate ekzamenitaj instruistoj kiel deviga lernofako.

Servistinoj por Francujo. Unu nia leganto el Cherbourg petas nin helpi kiel interpretistoj por forveturo de kelkaj ĉs. servistinoj en lian urbon, kiuj ĝenerale en Francujo estas nuntempe tre bezonataj. Tial ni petas la interesulojn turni sin al nia redakcio, kiu volonte donos informojn.

.....

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA.

(La raportojn por tiu ĉi rubriko oni sendu plej malfrue ĝis la 10. de ĉiu monato al k-do J. Pech, Plzeň, Houškova ul. 4.)

Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakujo. Laŭ oficiala raporto la Ligo aranĝis en Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo dum la pasinta jaro entute 26 kursojn por komencantoj, kiujn proksimume vizitis 500 ĝenerantoj. Al Ligo aliĝis nova sekcio: Třemošná apud Plzeň, kie nuntempe estas ankaŭ vigla mov-

ado. — La Ligo atentigas la membrojn, kiuj volas partopreni la XVan kongreson en Nürnberg aŭ IIIan tutmondan laboristan kongreson en Kasel, komuniki siajn adresojn al ĝi, por ke ĝi povu prozorgi la pasportojn kiel eble malkare. — Aliĝis kelkaj izoluloj el diversaj lokoj de Ĉeĥoslovaka respubliko. Estas videble, ke intereso por la lingvo internacia inter laboristaro tre progresas, sed ankoraŭ ekzistas multe da lab. esp., kiuj ne estas aliĝintaj al la Ligo. Tial ili estas petataj: Aliĝu, pligrandigu kaj plifortigu nian familion. En la nomo de malriĉaj esp. turnas sin Lab. Ligo esp. al ĉiuj bonkoraj esperantistoj, kiuj posedas nebezonaĵajn esperantaĵojn (ekz. lernolibrojn, broŝurojn ktp.) donaci ilin al mairiĉaj esperantistoj. Ĉiujn aliĝilojn, demandojn pri kursoj, raportojn, donacojn oni sendu je sekvanta adreso: Laborista Ligo Esperantista, Plzeň-Peklo, aŭ al ĝenerala sekretario de L. L. E. Vilda Büchl, Plzeň-Karlov, Pomezí č. 14.

Sekcio Oujezd apud Doubravka malfermis novan kurson, kiun partoprenas 64 lernantoj. La kurson gvidas J. Kodl. Nia ideo tie ĉi tre progresas kaj ni deziras al novaj adeptoj, ke ili estu baldaŭ perfektaj esperantistoj por helpi al ni fari novajn sulkojn.

Lobzy apud Plzeň. Ĉar multaj lab. esp. petis la Ligon fondi tie ĉi la sekcion, tiel ni turnas nin al ĉiuj esperantistoj el ĉirkaŭaĵo kun la peto, ke ili aliĝu ĉe Ant. Svoboda, Lobzy-Petřín n-o 148, aŭ ĉe Jos. Lenk, Božkov-Petřín n-o 201. Aliĝu tuj, por ke ni povu efektiviĝi la sekcion de L. L. E.

Všenice apud Radnice. Laborista gimnastika unuiĝo komencis kurson esp. por niaj membroj, al kiu aliĝis 53 junuloj. La kurso estas gvidata de k-do Antonín Nový, kiu estas edukisto de Lab. Gimm. Unuiĝo kaj ano de L. L. E. en Plzeň. La kurso okazas ĉiumarde je la 7—8 horo vespere en gimnastikejo. Dimanĉe la 8an aprilon aranĝis L. Gimm. Unuiĝo paroladon pri XIV. kongreso esp. en Helsinko. La parolado estis akompanata de 160 lumbildoj kaj k-do J. Pech el Plzeň konvinkigis multajn dubulojn, kiel necesa estas Esperanto por laboristaro.

Memoriinda datreveno. Sekcio Plzeň I. festos 10jaran jubileon de sia restado en laborista domo »Peklo«. Iama Lab. asocio esp., sekcio de Lab. Akademio en Praha, estis fondita antaŭ 10 jaroj. Poste ĝi translokiĝis (23an februaron 1913) el restoracio »U tří sokolů« en lab. domon »Peklo«. Malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj, kiuj nin persekutis, ni staras firme. Ni nur bedaŭras, ke kvankam ni havas preskaŭ 200 membrojn, ne estas inter ni multaj el la unuaj jaroj. Nun ankoraŭ restis al ni tri »lastaj mohikanoj«, nome Vojt. Babický, nia unua sekretario, J. Pech, kiu estis dum multaj jaroj prezidanto, sekretario, kasisto (li havis ĉiujn funkciojn ricepe dum milito, ĉar mankis anoj; li estis ĝeneralo sen soldatoj). La tria nomas Jos. Řežábek, kiu estas tre bona paganto de la kotizaĵoj, sed ni dubas, ĉu ju el niaj membroj konos lin, ĉar pro loĝmizero li loĝas ekster Plzeň, kvankam li en en la urbo laboras. Multaj disiris kaj multaj foriris tien, de kie ili neniam revenos. Por festi la jubileon la sekcio en proksima tempo aranĝos akademion, kiu certe estos amika kunveno de ĉiuj esperantistoj el Plzeň kaj el ĉirkaŭaĵo.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittel, Plzeň, Radyňská ul. 10. Presis laborista presejo, Plzeň.